B u l t e n o
DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA ĈE KULTURCENTRO DE ONV 2

15 jaroj

Kopio n-ro 1214
Ŝtata gravaĵo!
Tute sekreta! Berlin, 27.4.1942

Memorigoj al la ĝenerala plano „OST":

"La ĝenerala piano "Ost" supozas, ke post la milito oni devos senprokraste sidlokigi ĉirkaŭ 4,550,000 personojn en orientajn teritoriojn. Tiu ĉi nombro ŝajnos al mi ne tro alta, se oni kalkulas kun tio, ke la kolonigo daŭros 30 jarojn. Estas tute eble, ke ĝi povus esti eĉ pli alta."
Sekvas rubrikoj pritraktantaj unuopajn naciojn.nome Polojn, Ukrainanojn, Blankrusojn, Rusojn. Speciale interesas nin kompreneble la rubriko kun jena titolo:
PRI DEMANDO DE CEĤOJ" Laŭ nuntempa opinio la Ĉeĥoj povas esti grandparte germanigitaj, ĉar ili ne kaŭzas zorgojn el rasa vidpunkto. Ĉirkaŭ 50 % de la ĉeĥa loĝantaro entute povas esti germanigitaj. Eĉ tiu ĉi kalkulo restas tamen ankoraŭ 3,5 milionoj da Ĉeĥoj, kiuj ne taŭgas por la germanigo kaj kiujn oni devos pograde ellokigi el la teritorio de la regno.
Oni devas konsideri, ke tiuj Ĉeĥoj estu translokigitaj al Siberio, kie ili intermiksiĝos kun Siberianoj kaj tiamaniere kontribuos al plua fremdiĝo de Siberianoj rilate al rusa nacio. La vertonta germana politiko koncerne la Orienton montros, ĉu ni vere estas pretaj garantii la firman bazon por daŭra ekzisto de la Tria Imperio. Se la Tria Imperio devas ekzisti mil jarojn, niaj projektoj devas esti ellaborataj por tutaj generacioj. Kaj tio signifas, ke la rasa-biologia ideo devas en la proksima germana politiko posedi decidan rolon. Nur tiel ni povas sekurigi la estontecon de nia nacio.

D-ro WETZEL,
departamentestro de la 1-a
politika cefadministrejo de la ministerio
por okupitaj orientaj teritorioj."

Legante tiun kaj la similajn arkivaĵojn, oni ne povas eviti impreson de preskaŭ utopia nerealeco. Kaj tamen, milionoj da murtigitaj viroj, virinoj, infanoj, de kiuj eĉ cindro jam ne restis, atestas la teruran fakton de tiu historia frenezo de nia jarcento»
Pri "miljara regno" revis la fanatika doktoro, ne supozante, ke post nur tri jaroj li vidos malgloran finon de la antaŭtempa gloro. Ĉar estas tro kuraĝe en nia epoko kalkuli kun miloj da jaroj, en epoko, kiam la du- kvin-, sepjaraj planoj transformas la aspekton de ŝtatoj kaj la vivon de popoloj. En epoko, kiam la sciencaj atingaĵoj superigas fantazion de utopiistoj... Kio estos post mil jaroj? Jen - post nuraj dekkvin jaroj la Tria regno fariĝis nur estinta fantomo. Post dekkvin jaroj la landoj liberigitaj de la naciisma okupacio rapide ŝanĝas ne nur sian aspekton, sed ankaŭ la internan vivmanieron.
Hodiaŭ en socialisma Ĉeĥoslovakio, kies ĉeĥa logantaro estis kondamnita al duonevakuado, kreskis la produktiveco de la laboro en la industrio dum 10 jaroj /1948-1958/je 232%, kio ebligis la rapide kreskantan vivnivelon de ĉiuj laboruloj. Ĉirkaŭ 80% de agrokultura tero apartenas al kooperativoj aŭ ŝtataj bienoj. Tio senkompare ŝanĝis socian karakteron de nia kamparo, ĉar rapide malaperas diferenco inter urbanoj kaj kamparanoj.
Sur ĉi tiu bazo disvolviĝas grandioza kultura revolucio, celanta al altnivela socio de homoj, ĉiuflanke memfidaj kaj klerigitaj, ĉar nur tia socio estos matura por efektivigi la komunismon. La 15-a datreveno de liberigo trovas nin survoje al efektivigo de tiu longtempa homa revo. Ni esperantistoj, tiom alkutimiĝantaj traboradi novajn vojojn, ne timu marŝi en la unuaj vicoj de la veraj homoj, kiuj iras antaŭen al feliĉa komuna vivo de ĉiuj popoloj sur nia planedo.

jmh

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 2,
Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

UNESCO HONORIGAS LA NOMON DE D-RO L. L. ZAMENHOF

La deka sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO akceptis rezolucion /5,15/, per kiu ĝi invitis ĉiujn Ŝta tojn-Membrojn kaj la Naciajn UNESCO—Komisionojn fari al la ĝenerala Direktoro proponojn pri "celebrado de datrevenoj de grandaj personecoj kaj eventoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, okazontaj en jaroj 1959-1960".

Inter proponoj faritaj al la Ĝenerala Direktoro estis ankaŭ nomo de D-ro L.L.Zamenhof. La proponon pri Zamenhof faris Brazilo, Japanujo kaj Universala Esperanto-Asocio kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESCO /Dok. 55 EX/5 de Oktobro 1959/.

El la protokolo de la kunsido okazinta en Parizo la 25-an de Novembro 1959 sekvas, ke la propono pri Zamenhof rioevis en la Plenuma Komitato 'fortan apogon kaj estis unuanime akceptita.

Efektivigante la decidon de la Plenuma Komitato, la Ĝegerala Direktoro de UNESCO sendis al ĉiuj Registaroj kaj Naciaj UNESCO-Komisionoj cirkuleran leteron Cl/1406 de la 15-an de Februaro 1960, invitante ilin celebri en 1960 la datrevenon /centjaran/ de la naskigo de L.L. Zamenhof.

La decido de UNESCO estas vera kro- no de la bfila Zamenhof-jaro.

/Mallongigita laŭ ESPERANTO-revuo/

II. NACIA SPARTAKIADO 1960

23.6. – 3.7.1960 okazis en Praha - Strahov grandiozaj gimnastikaj festoj, vizititaj ankaŭ de multaj eksterlandaj gastoj. En la grandan stabon de interpret stoj la Esperantista Kluho en Praha ce Kulturoentro en Praha 2 liveris 15 fremdul-gvidantojn. Esperantistoj el diversaj landoj povig uzi iliajn servojn petante de la aranĝistoj aŭ de la vojaĝagentejo ČEDOK nur esperante parolantajn gvidantojn.

ESPERANTA BIBLIOTEKEJO en Praha malfermita

30.4.1960 vespere je la 19-a horo la komitato de Esperantista kluho en Praha solene malfemis novan propran bibliotekejon en strato Týnská 3 en Malnova Urbo. La ejo, kvankam malgranda, multe kontribuos al nia laboro. Ĝi trovigas en urbocentro, kio mem estas tre gravaj ĝi havas eniron direkte el la strato, ĉar estas adaptita butiko, kaj posedas ankaŭ montrofenestro. La strateto Týnská, ŝajne sensignifa kaj mallarĝa, havas viglan turisman trafikon, precipe dum la sezono. La domo mem, "Ĉe Nigra Elefanto" estas valora historiaĵo. Sed la eksteraj avantaĵoj ne estas kompareblaj kun tiuj de la interno. Ĉar kun siaj pli ol 4 mil libroj-titoloj ĝi estas unu el la plej grandaj tia-specaj bibliotekejoj en la Eŭropo.

Provizore oni deĵoras en la bibliotekejo ĉiuvendrede de la 16-a gis la 18-a horo /s-ino Brotánková/. Dum tiuj horoj niaj membroj povas pruntepreni librojn. En proksima tempo intencas la komitato aranĝi tie malgrandan legejon de esperanta gazetaro. Certe ni ĉiuj baldaŭ sentos la utilecon de tiu ĉi ejo. Niaj plej koraj dankoj estu do esprimataj al tiuj oferemaj samideanoj, samideaninoj kaj bonfarantoj ekster nia movado, kiuj multajn monatojn portis pezan ŝarĝon de la tasko, el neglektita razista butiko krei belan angulon de kulturo. Tamen ilia plej bela kontentigo estas fakto, ke la laboro sukcesis.

TELEGRAMO AL PREZIDENTO HO-ĈI-MINH

19. 6. 1960 /70-jaroj/.

"Estimata kamarado, kore gratulas vin pro via vivojubileo grandan sukceson en laboro pro popola Vietnamo kaj por paco deziras

Kulturcentro Praha 2,
Esperantista klubo
Ĉeĥoslovakio."

TRIUMFO DE ĈEĤOSLOVAKA SCIENCO

Malmultaj sciencaj malkovroj estas veraj malkovroj. Ordinare ili rezultas malrapide kaj sinsekve el multaj per pripenso zorge klasifikitaj observadoj. Alian fojon oni paŝas al ili laŭplane eĉ jarojn, detale esplorante promesantajn konjektojn. La vojo de pruvoj, kiuj poste sekvas, estas denove la dornoplena vojo de laciga laboro, postulanta necesan kvanton da pacienco kaj persistemo. Ĉiuj sciencaj fakoj elkreskis laŭ tiu ĉi vojo, same polarografio tiamaniere fariĝis memstara scienca fako, signifanta unu el la plej grandaj kontribuoj de ĉeĥoslovaka scienco al la mondprogreso.

Ĝian estigon ni trovas en la jaro 1919. Tiam apenau tridekjara docento de fizika kemio Jaroslav HEYROVSKÝ komencis labori pri problemo de kurblinioj de Kučera. Tiu ĉi laboro estis ligita kun mezurado kaj pesado de gu- toj de hidrargo. Estis necese akiri grandan amason de eksperimentaj datoj. Kvankam Heyrovský laboris pene kaj persisteme preskaŭ kvar jarojn, la amasiginta materialo ne sufiĉis por klarigi la problemon. Ĉar ĝisnuna metodo de la laboro ne celis solvon de la problemo, Heyrovský ŝanĝis ĝin kaj komencis studi la kurenton pasantan tra guta hidrarga elektrodo. Nova metodo de la laboro alportis neatenditan rezulton - kvankam oni ne povis plene klarigi la bazan problemon, ŝanĝo en ĝia solvo kondukis al estigo de nova scienca fako, la polarografio. Tio estis en la jaro 1922.

En la jaro 1925 profesoro Heyrovský kune kun sia lernanto Shikata konstruis la unuan polarografon.

Mondsukceso ne venis tuj. Ĝis tridekaj jaroj la polarografio estis en eksterlando konata, sed relative malmulte uzata. Nur tiam aperis kelkaj eksterlandaj skoloj, kiuj efektivigis esplorojn en la polarografio kaj komencis granda evoluo de industria uzo de la metodo. Plua larga disvolviĝo de polarografie teorio kaj kun ĝi ligita čiam pli granda uzado en scienco kaj tekniko komencis ĉirkaŭ la kvindeka jaro kaj estas daŭrigata.

Hodiaŭ oni malfacile povus kalkuli ĉiujn fakojn, kie ĝi servas al tekniko kaj scienco.

Ĉefan aplikon ĝi trovis tie, kie oni devas difini etajn kvantojn da almiksaĵoj kaj kie ĉe tio oni substrekas simplecon de laboro kaj malgrandajn postulojn kaj karecon de ekipaĵo. Oni uzas ĝin en metalurgio por rapida analizo de metaloj kaj fandaĵoj, en geologio ĝi faciligas metaloj, oni fermenta kaj zorgas pri pureco de medikamentoj, ĝi ŝirmas la sanon de laboristoj antaŭ efikoj de haladzaj vaporoj en aero kaj gravan uzon ĝi trovis en medicina diagnozo. Plej konata estas reakcio malkovrita de la unua asistanto de profesoro Heyrovský, akademiano R.Hrdlička, kio estas uzata por sekvi la proceдon de karcinomo.

Por la polarografio ekzistas senlimaj eblecoj. Tie, kie analizo per malnovaj metodoj daŭris horojn, la polarografio ĝin scias fari dum duonhoro.

Kvankam en la mondo jam ekzistas pli ol 6000 sciencaj verkoj pri polarogrgfio, la polarografia skolo de Praha ĉiam konservas sian unuan lokon.

Kaj ĉi jare la Reĝa akademio de sciencoj en Stokholmo aprezis la laboron de profesoro Heyrovský per Nobel-premio. Li envicigis inter sciencistoj starantaj sur la pinto de samtempa scienco.

Plena sukceso de la polarografio estis ebligita dank' al la laboro de multaj sciencistoj en la tuta mondo. Tion al ni memorigas vortoj de profesoro Heyrovský: "Izolita unuopulo apenaŭ povas nun en la scienco akiri penetreman sukceson, ankoraŭ pli malmulte li povas larĝe kaj profunde disvolvi sian verkon kaj garantii ĝian sukcesan vojon tra la mondo."

Pavel Tichý

EN POLLANDO

fondiĝis 2.3.1960 Esperanta Geologo-Klubo. Skribu al adreso:
Pola Esperanta Geologo-Klubo, str. Jasná 6, Varsovio 10, Pollando.

ADMINISTRACIO DE NUNTEMPA BULGARIO anoncas, ke estasankoraŭ eble mendi la revuon por ĉi-jaro.

ZNOJMO - loke de 1a nunjara SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO 11,-24.7.1960

Esperantista klubo ĉe loka OB en kunlaboro kun ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato kaj sub protektado de konsilantaro de MNV /Loka Nacia Komitato/ aranĝas ĉi jare la Kolegion.

KURSOJ: A/baza - por komencantoj
B/baza - por progresintoj
C/Esperanta seminario - por Spertaj esperantistoj kaj frekventantoj de instruistaj ekzamenoj.

LOĜIGO: 110 litoj en 2 hospicoj kun bona ekipo, 22 litoj en unu kompleta hotelo, 50 litoj en privato.

MANĜO: en hotelo ZNOJMO INSTRUHOROJ: por kursoj ABC ĉiutage 7.30-11 krom dimanĉo en la ejo de loka OB.

KOSTOJ /kurso, loĝejo,manĝo/:
Grupo I.- turisma Kčs 366
" IX.- privato Kčs 416

En la prezo estas enkalkulita la kurspago, loĝigo, manĝo /3 manĝoj potago/ kaj enirpagoj por ĉiuj posttagmezaj kaj vesperaj aranĝoj, inkluzive la ekskurso al valbaraĵo Vranov. Kuirejo estos bonkvalita, tamen interesuloj povus ricevi individuan manĝaĵon en hotelo por normalaj prezoj.
La ĉeestantoĵ havas 50% rabaton por fervojo.
NOMBRO DA ĈEESTANTOJ – estas limigita por 200. Estas do necese aliĝi sen troa hezito. La aliĝojn sen kotizo oni ne akceptas. Lasta dato por aliĝi estas la 30-a de Junio 1960. TAGPROGRAMO:
ĝis 7,3o matenmanĝo
7,3o - 11,oo instruado
11,00 - 11,30 duonhoro ĉe piano
11.30 – 13,3o tagmanĝo
13,30 - 16,3o posttagmeza prograno
16,30 - 18,00 ripeto delecionoj
18,00 - 19,30 vespermanĝo
de 19,30 vespera programo

POSTTAGMEZAJ PROGRAMOJ:
Trarigardo de la urbo, naĝado en la rivero Dyje, vizito de muzeo, modernaj konservfabrikoj, brigado por konstruo de astronomia observejo, ekskurso al historiaj monumentoj de Znojmo, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon.

VESPERAJ PROGRAMOJ:
Interkonatiga vespero, prelegoj, vesperoj ĉe epidiaskopo, koncerto de Sudmoravia kvarteto, filmoj, kampofajro, dancvespero en vinkelo en Přímětice, teatra prezentado de PIGMALIONO /"Verda ĉaro'/, ktp.
En kadro de la SOMERA KOLEGIO okazos SEMINARIO DE INTERNACIAJ RILATOJ, en kiu prelegos eksterlandaj gastoj kaj unutaga ekskurso al valbaraĵo VRANOV kaj la kastelo.
Aliĝilon, pagojn kaj ĉiun korespondaĵon sendu al adreso: KLUB ESPERANTISTů , ZNOJMO
/el oficiala aliĝinformilo'

SET - SOMERA ESPERANTISTA TENDARO
En Arĝenta Golfo apud LANĈOV ĉe valbaraĵo VRANOV okazos ekde 17-a julio ĝis 13-a aŭgusto 1960 en du etapoj tendaraj KURSOJ DE ESPERANTO.
I. etapo: 17.-30.7.1960 por plenkreskuloj, komencantoj, progresintoj, instruistoj, en grupoj A,B,C,D.
II. etapo: 31.7 - 13.8.1960 por komencantoj kaj progresintoj en grupoj A,B,C. La grupo A estos dividita je kurso por junularo kaj por plenkreskuloj.
La tendaron aranĝas en la komisio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato Dům osvěty /Kleriga domo/,fako de Esperanto kune kun baza organizacio de Svazarm ĉe DO en Třebíč.
Loĝado en tendoj duope kaj malgranda nombro en kabano. Manĝo kvin foje dum la tago. La tendaro situas en oportuna enirpunkto por diversaj ekskursoj, nome al kastelo Vranov, al fortikaĵo Bítov, al sudmoravia metropolo Znojmo kaj al plej grandaj en Europo vinkeloj en Přímětice, ktp. Banejo apud la tendaro.
la tuta restado kostas Kčs 250,- kio estas pagota almenaŭ 14 tagojn antaŭ komenco de la etapo. Oni akceptas ĉeestantojn nur por la tuta etapo kiuj estas pli aĝaj ol 12 jarojn.
Ĝis la 15-ar de junio 1960 oni povas ricevi 5o% fervojan rabaton. Antaŭpago por aliĝo estas minimume Kčs l00,-; al aliĝanto, kiu almenaŭ 14 tagojn antaŭ komenco de la tendaro nuligos sian aliĝon, oni redonos duonon de la antaŭpago. t.e.Kčs 50, -. INSTRUADO ĉiutage de 8 ĝis 12,00, 3 horojn esperanto kaj 1 horo de politika kaj defenda edukado.
Detalajn informojn, aliĝilojn kaj bankpagilojn sendas „Dům osvěty, esperantský kroužek, Třebíč".
Aliĝilojn oni sendu al adreso: Magda MATUŠKOVA, Třída Spojenců 18, OPAVA.

TAGOJ DE AMIKECO DE ESPERANTISTOJ en ÚSTÍ n LABEM kaj TEPLICE LÁZNĚ

Sub tiu titolo okazis 17-18.4. interesaj aranĝoj, kiuj povas esti imitinda ekzemplo pri aktiveco por la ceteraj esp. rondetoj. En la organizo partoprenis komune ambaŭ rondetoj kaj la programojn ĉeestis esperantistoj ne nur el tiuj ĉi urboj, sed el pluraj aliaj. Kian klubon reprezentis komitatanoj Mařík kaj Bárochová, krome ses klubanoj. Dimanĉe okazis en Ústí tre sukcesa publika prelego de progresema japana verkisto KEI KURISU el Tokio: "Japanio de hieraŭ k. de hodiaŭ“, kiun ĉeestis ankaŭ oficialaj reprezentantoj./La parolado estis afiŝita kaj menciita ankaŭ de Radio Praha. /

Post komuna tagmanĝo sekvis ekskurso al Střekov kaj al la batalejo apud Chlumec kaj Přestanov. Vespere okazis informa kunveno en ZK ROH Závody B. Němcové en Lázně Teplice kun vigla diskuto. En la nomo de Ĉeĥoslovaka Esp.-Komitato parolis Pr.Sviták.

Amuzan programon prezentis Ostravanoj, Lunde,la satir-teatra kolektivo "ERINACO" el Ostrava prezentis kon-traŭmilitan teatraĵon "Jozefo ekskursas al Marso"“, verkitan de nia ano Z. Ĉapek. Poste sekvas konatiĝo kun vidindaĵoj de Teplice Lázně. La ĉeestantoj disiris kun sento, ke la aranĝo estis bona ideo kaj bone plenumita. jm

RENKONTO KUN HUNGARAJ AMIKOJ

Mi apartenas al tiuj feliĉuloj, kiuj havis la agrablan okazon ĉeesti la 3-an Nordhungaran Esp.-Renkonton en MISKOLC. Ĉar mi estas nova esp.-ino, mia unua renkonto kun tiom da homoj parolantaj en Esperanto estis por mi granda neforgesebla travivaĵo.

Ĵaŭde, la 12-an de Majo 1960, mi transpasis nian landlimon kaj vespere mi alvenis Miskolcon, kie min kore akceptis miaj du korespondantoj J.Lorinczi kaj I. Temesi.

Vendredo apartenis al Budapesto: kiu vizitis ĝin, neniam forgesos tiun belulinon, kiun oni prave vicigas inter la plej belajn urbojn en la mondo.

Sabate, dum antaŭtagmezo alvenis el Budapeŝto al stacidomo de Miskolc multaj gastoj, fervojista Esp.-junularo kaj ankaŭ nia kara s-ano JULIO BAGHY.

Mi ofte aŭdis paroli pri "paĉjo Baghy" kaj vere, kiam ni ĉirkaŭprenis kaj kore kisis nin, tiam mi eksentis, ke ankaŭ mi estis akceptita en lian grandan esperantistan koron, kaj mi sentis min feliĉa.

Sed la plej granda travivaĵo estis solena kunsido en granda salono tute plenigita de homoj, parolantaj la saman lingvon, kunligitaj per la sama ideo, servi al interpopola konatiĝo kaj kompreno, servi pere de Esperanto al bona afero de monda progreso kaj porpaca batalo. Kaj kiam mi poste salutis ĉiujn en la nomo de nia Esp.-Klubo en Praha, post kio ili kore aplaŭdis, mi sentis min ĉe tiu amika lando, kiel hejme. Sed tio ĉi, kvankam grava, ne estis celo kaj rezulto de la renkontiĝo.Plej signifanta estis, ke dum tiuj tagoj firmigis solidareco inter ni ĉiuj, Ĉeĥoslovakoj kaj Hungaroj. Ĉar en ĉiuj la komuna lingvo plifortigis deziron pri internacia paco, reciproka estimo, kultura kunlahorado kaj pli fervora aktiveco en konstruado de socialismo en niaj frataj landoj.

Dimanĉe, antaŭtagmeze ni ĉiuj iris por inaŭguri la Esperantan straton en Miskolc kaj veturis per aŭtobusoj al belega banloko TAPOLCA, kaj post la tagmango mi respondis kelkajn demandojn por Radio-dissendo. Posttagmeze oni vizitis ĉarman lokon LILAFURED, kie okazis inaŭguro de "Esperanta fonto".

Sed kiel la konata proverbo diras: "Nenio beja en la mondo daŭras eterne“, tial ankaŭ ni devis adiaŭi.

Mi kredas, ke ĉiuj, kiuj travivis la renkonton en Miskolc, konservos la memoron pri tiuj tagoj en ĝojo kaj jen priskribinte miajn impresojn, mi en pensoj revenadas al vi, miaj novaj hungaraj amikoj.

M. Josková

---

30.7.-6.8.1960 efektiviĝos en BRUSELO en nova Palaco de Kongresoj /kiu situas en centro de la urbo/ la 45-a Universala Kongreso de Esperanto sub la protektado de Lia Moŝto Baŭduino, reĝo de la Belgoj. Prezidanto de la Senato Paul Struye, prezidanto de la 5ambro de deputitoj baxono Kronacker, ĉefministro Gaston Eyskens, ŝtatministroj kaj aliaj belgaj ĉefuloj. Oni jam preparis fakajn kunvenojn, infankongreseton kaj aliajn aferojn. ek

KION ALPORTIS ESPERANTA PRESO PRI NI –
VIVO KAJ SANO /Tesaloniko/ Grekujo: Nova gazeto. En sla dua kajero ĝi alportas longan artikolon pri paciento de d-ro J. Stuchlík. La malsanulo elpensis 17 artefaritaj lingvojn. En numero 3 ni provas fablon de J. Marek: "Kiel evoluiĝis la kritiko en leona imperio." Tradukis J. Chvosta.

NORVEGA ESPERANTISTO en numero 8 sub la titolo "Pigmaliono - brila prezento en Varsovio" alportas aur la unua paĝo raporton pri la prezentado kun fotografio de du ĉefaj roluloj, gesamideanoj E. Seemannová kaj P. Sádlo.

VIETNAMIO ANTAŬEN MARŜAS /Hanoi/ ĝis hun aperis du kajeroj kun abunda kaj interesa materialo pri Vietnamio kaj ĝia kultura evoluo. En la rubriko "La kulturo" ni legas: Hospitalo instalita kun la helpo de Ĉeĥoslovakio malfermigis en Haiphong post du jaroj de konstruado.

LA REVUO ORIENTA /Tokio/ estas la sola vere regule nin informanta revuo de japana Esperanta Instituto. En ĝia 5-a kajero ĝi dediĉas plenajn du paĝojn al la prezentado de "Legendo pri amo" de Nazim Hikmet, kiun la teatra grupo de Esperantista Klubo en Praha VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY dufoje prezentis en Praha. LA REVUO ORIENTA ĉerpis informojn el nia BULTENO.

Nacia artisto pentristo MARTIN BENKA donacis 18.3. 1960 sian atelieron kaj faritajn pentraĵojn al la stato. Martin Benka estis membro de Esperantista Klubo en Praha.

La 24-an de Aprilo 1960 aranĝis nia rondeto solenan ornamon de tombo de ĉeĥa poeto, tradukinto de "Mirejo", Sigismund BOUŜKA, laŭ peto de Mistralanoj kaj Esperantista Klubo en Marseille.

En n-roj 25 kaj 26 de La Nica Literatura Revuo aperis malgranda antologio de ĉeĥaj poetoj en traduko de Rudolf Hromada. R. Hromada elektis poemojn de A. Heyduk, J. V. Sládek, F. Šrámek, J. Seifert kaj aliaj.

ŜTATA ELDONEJO POR SPORTO KAJ TURISMO
decidis eldoni belan gvidlibron tra PRAHA en jaro 1961. Aldone al tiu ĉi numero de BULTíHO ni almetas specialan cirkuleron de la nomita eldonejo, kiu samtempe servas kiel mendilo por la libro lit cirkulero estas ĉeĥlingva por eksterlandaj interesuloj ni mencias kelkajn notojn: PRAHA-Gvidlibro enhavos historian skizon pri la urbo, vidindaĵojn, sciencajn kaj kulturajn objektojn, sportejojn,ekskursojn tra la urbo kaj en la ĉirkauaĵon, ĝeneralajn informojn /kompletan adresaron de ĉiuj hoteloj, teatroj, muzeoj, kinejoj, ambasadoj, ktp./vortareton kaj indeksojn. Interesa enhavo estas pliriĉigita per elektitaj malnovaj legend-oj. Specialaĵo de la Esp. eldono de tiu ĉi gvidlibro, sukcesinta jam en la rusa, angla kaj germana lingvoj, estos informoj kaj historiaj notoj pri la Esp.-movado en Praha. La libro havanta 190 pagojn, 16 fotografaĵojn, 25 desegnojn,kolirajn planojn de la urbo kaj ĉirkauaĵo kaj de la trafika reto, kostos bindita proksimume Kčs 16,-. Adreso de la eldonejo: Sportovní a turistické nakladatelstvi, prod. odd., Klimentská 1, Praha 3 - Nové Město.

La ĵus aperintan informan broŝuron JUĜU MEM! - Faktoj pri Ĉeĥoslovakio liveras la ĈEK, Blanická 4, Praha 12, al enlandaj esperantistaj rondetoj kaj al interesuloj el eksterlando. Petu ankaŭ la ĵus aperintan faldpros-pekton ĈEĤOSLOVAKIO EN NOMBROJ.
Certan kvanton de la ambaŭ eldonaĵoj havigis al si ankaŭ la Radio por siaj gekorespondantoj skribantaj en Esperanto.

LA NOVA VORTARO. Ĉiuj rondetoj en nia lando estis informitaj de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, ke la Ŝtata pedagogia eldonejo intencas eldoni Esperanta-ĉeĥan kaj Ĉeĥa-esperantan poŝvortaron de Rud. Hromada. Sekve de tiu informo venis pli ol 5000 mendoj. La manuskripto estis jam akceptita de la eldonejo. Ni esperu, ke la vortaro aperos fine de la nuna jaro, kiel antaŭvidas la plano.

LA LERNOLIBRO. La fina redakto de la lernolibro de prof. KILIÁN estis aprobita kaj la lernolibro aperos ankaŭ fine de la nuna jaro.

D-ro AUGUSTIN PITLÍK MORTIS

La 5-an de Aprilo 1960 mortis en Praha unu el la plej malnovaj esperantistoj ĉeĥaj, d-ro Augustin Pitlík en aĝo 77 jaroj. Li naskiĝis la 24-an de Julio 1883 en sudbohemia loko Bavorov. Post la studoj en la universitatoj de Praha kaj Strassbourg li estis licea profesoro - 1908 ĝis l912 - post la unua milito li doktoriĝis kaj estis supera oficisto de la ministerio de komerco /ĝis 1945/.

D-ro Pitlík famiĝis farinte dum 1912-13 - kiel la unua esperantiste en Europo - sukcesan rondvojaĝon tra 1a ŝtatoj eŭropaj, dum kiu la faris en 33 urboj esperanto-prelegojn /kun lumbildoj/ pri Praha kaj la ĉeĥa popolo. En 1921 li, kiel ĝenerala sekretario kongresa, gvidis laborojn par la neforgesebla 13-a Universala Kongreso en Praha. En 1922-38 kaj 1947 ĝis 1950 d-ro Pitlík estis lektoro de Esperanto ĉe la Politeknika Alta Lernejo en Praha, en 1950-33 ŝtata ekzamena komisaro pri Esperanto kaj de 1923 ĝis 1929 direktoro de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto, kiun li fondis. D-ro Pitlík fariĝis membro de Lingva Komitato en 1924 /membro de Akademio de Esperanto 1949/. Li estis oficiala delegito de diversaj ministerioj ĉe UK en Hago 1920 kaj Budapeŝto 1929 en la konferencoj de Venezia 1923 kaj Ĝenevo 1924. Li multe klopodis penetrigi nian lingvon en novajn fakojn kaj li faris la unuan radio-prelegon en Radio Praha en 1923.

La nova generacio de esperantistoj lin konas kiel direktoron de la fama Somera Esperanto-Kolegio en Doksy dum jaroj 1947-1957.

D-ro Pitlík, laborinta dum kvindek sep jaroj por nia afero certe meritas resti en la memoro de ĝiaj nunaj kaj estontaj adeptoj.

La edzino de d-ro Pitlík mortis 14 tagojn antaŭ li. Restas sole lia frato al kiu ni esprimas nian sinceran kunsenton. R.H.

EL KUTNÁ HORA venis malĝoja sciigo pri morto de nia membro profesoro JOSEF KOŽENÝ, elstara esperantisto kaj konata gramatikisto. Li mortis post longa malsano, kiu daŭris ekde somero 1958. Kiel preciza lingvisto li restos čiam viva en nia movado.

K.M.Waló: EN OMBRO DE LA LITO /E1 "Nigra madono'*/

Karulo mia, estas jam malfrue,
vizit' finiĝas, devas vi foriri,
donu la manon kaj venu morgaŭ denove
depost la dua hor' kun mi babili.

Ne donu florojn, mi volas esti izolita,
kiam vizitis min la stranga gasť,
kiu sen paŝoj iras tra la porď fermita,
por kiu ne validas horloĝ-plan vizita.

Ne diru "ne", mi scias, ke li certe venos,
eble matene jam, aŭ dum vespero - foriros mi kun li kaj certe vi min kredos,
ke estos ĝi nur la unua malfidelo.

(El la lastaj tradukoj de nia s-ano JOĴKO STANĚK, kiu forpasis la 20-an de Novembro en jaro 1959.)

Kun malĝojo ni sciigas vin, ke la 20-an de Januaro 1960 mortis membro de EKP, s-ano prof. d-ro Hugo JOKL el Tábor. Prof. d-ro H. Jokl naskiĝis la 24-an de Aprilo 1891 kaj fariĝis esperantisto en jaro 1908. Dun la tuta vivo li restis aktiva esperantisto, ĝis kiam longa malsano finis lian vivon.

NI GRATULAS

La 5-an de Aprilo 1960 je la 15-e horo 30 min. forveturis el Praha nia membrino f-ino Jiřinka HOLÁ, vojaĝante al sia nova patrujo, al Svedlando, kie ŝin atendis ŝia estonta edzo. Multaj geklubanoj akompanis ŝin al la stacidomo por adiaŭi ŝin kaj deziri al ŝi multe da feliĉo. Ankaŭ ni ĉiuj, kiuj ne povis partopreni, deziras al ŝi sanon kaj kontenton en ŝia venonta vivo.

Nia membrino Anna HEJNOVÁ festis la 11-an de Marto 1960 sian 65-an naskiĝtagon. Ni deziras al ŝi multe da sano por venontaj jaroj.

BONVOLU ATENTE LEGI !

Al ĉiuj atendantoj de "Bulteno" esperantan saluton! Esperantistoj esperas kaj fine la espero realigas. La Bulteno fine aperis, fine la morgaŭo fariĝis hodiaŭo. Estis la granda klopodo kun redaktoro pri tiu ĉi nocio MORGAŬ. Interparolante pri Bulteno li serioze diris: "Morgaŭ ĝi aperos." "Nu bone", trakuras nian kapon, "mi iros al li morgaŭ" .

Veninte al li la alian tagon mi demandas: "Ĉu...", sed mi ne finparolis. "Mi diris ja morgaŭ!", interrompas la redaktoro,"kaj vi venas denove hodiaŭ. Senkomprene mi gapas,"kio?" kaj denove la frazo ne estas finita. "Nu, kial vi gapas?", diras li, "ĉune estas hodiaŭ? Morgaŭ ja estos morgäu!" kaj mi ekkomprenis, jes, morgaŭ estas neniam.

En kelkaj gastejoj iam estis skribite sur tabuleto per ornama skribo:

HODIAŬ ONI PAGAS, MORGAŬ SENPAGE.

Kion fari? Kiel superruzi redaktoron? Jen la ideo, fiksi la daton! Kaj al tiu ideo vi danku, karaj legantoj, lekante, pardonu, legante la hodiaŭan "Bultenon".

Si tamen aperados kaj en ĝi tiu ĉi "anguleto" - "GAJA OBSERVANTO". as

DEZIRAS KORESPONDI :

BULGARIO:

= MNKA STANILOVA DIMITROVA, ul.G. Dimitrov 86, Kazalnik, interĉ.L,PK,PM,lib- rojn kaj gazetojn.

s VASIL D.VELCEV, urbo Cvee Delcev pod: 6671, Koprivlen,19-jara,int.L,BK,PM kun ĉiuj landoj.

= V.N.SIVAROVA,Veličko-Kostov 34,Varna 14-jara pri Esp.kun Ĉeĥoslovakoj.

ĈEĤOSLOVAKIO: OTTO FUĈIK, Vlašská 362/3, Praha1, koresp. interŝ I BK. L, PI, kun ĉ. 1.

= MARIE VESELÁ, Žateckých 5, Praha l4, kolekt. k. interŝ.marionetajn teatraĵojn en Esp. traduko,

= RŮŽENA JÍRKOVÁ, Karafiátová 82,Praha 10, pri pedagogio,lingvistiko,historio k.interlingvistiko kun instruistoj kaj profesoroj tutmonde.

= PAVEL DOBIÁŠ, Markova 1111, Frenštát p. Radhoštěm, koresp. interŝ. PM,

HISPANUJO:

= FELlX MONSO FERRER.Str.Rasell 9, Hospitalet/Barcelona/, 19-jara kun ĉ.l.

= MARIANO AVROYO MORENO,Str.Maladev 9, Casa de la Selva, Gerona-juna trompetisto, koresp. kun ĉ. 1.

= MANOLO VAZAUES GONZALES, Str.Rios 42, San Felin de Llobregat, Barcelona,lernanto, koresp. kun gesam. el ĉ.l.

SOVETUNIO:

= VIKTOR ĈUMAKOV, Saltykov ŝĉedrin 32/34.log.13, Leningrad123, koresp. kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

= MEDE ISAITÉ/LAIMA, f-ino, Stalino pr. No.89/43/7, Kaunas Litova SSR.

= LEO TEDER, Parmu mnt 18, Kilinginomme.Estona SSR, serĉas amikojn k. dez. interŝ. PM kaj EK.

= VELLO ROND, Kirsi str. 25, Tallin 9, 14-jara interŝ. PM kaj IPK,

ĈINIO:

= LI-CHENG-ZHI, Zhongguo Chongging,Zhongliangshong, Chonging Luntaichang, dez. koresp.,interŝ.PI,PM k.alumetetikedojn

DANLANDO:

= BOLETTE SPORLEDER, f-ino,Danneborgsgade 20, Aalhorg,dez.inters.PL,k.PM.

= BIRTHE JACOBSEN,f-ino,Karlunsvgg 3, Aalborg, 22-jara, dez.koresp.kun ĉ.l.

ANDERS PEDERSEN Fredesveg 39, Taastrup,Ljalland, dez.koresp.interŝ.PM k.1K

POLLANDO:

= BERNARD JARZYNKA, Pow.Brodnica, Gorzno 17- jara stud.,kol.PM k.PI.korespondas.

JERZY WELOWSKI,poste restante Lodž 9, 18- jara stud.,dez.koresp.pri turismo, literaturo, teatro, filmo, muziko, kantoj kaj pri problemoj de gejunulara vivo.

---

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe Kulturcentro de ONV Praha 2, eldonas: Kulturcentro ONV 2. Respondeca redaktoro: J.M. Havlík, Plamínková 12, Praha 7, tel. 73637.